

3 interklučitaj
motorvagon-
kombinaĵoj
sinkronige
kondukataj



Jam ekde jardekoj, *UIC*-terminaro enhavas tri ĉi koncernajn nociojn 03825, 08954 kaj 09502 – ĉiuj sen difino. Laŭ la – parte ĥaosa – komparo de nacilingvaj terminoj ni elektu sufiĉe taŭgajn, precipe konsidere la originajn francajn terminojn. Verŝajne nocio 09502 estas la sama kiel 14660.

	03825	08954	09502
ĉeĥa	<i>vícenásobné řízení</i>	<i>vícenásobná trakce</i>	<i>vícenásobná trakční jednotka</i>
dana franca	<i>multipel styring fonctionnement en unité multiple</i>	<i>multipel traktion traction multiple</i>	<i>multipel traktion unité multiple</i>
germana hispana	<i>Mehrfachsteuerung funcionamiento en unidad múltiple</i>	<i>Mehrfachtraktion tracción múltiple</i>	<i>Mehrfachtraktion unidad múltiple</i>
hungara itala kroata	<i>többes távvezérlés trazione multipla vuča s više vučnih jedinica</i>	<i>vontatás előfogattal trazione multipla višestruka vuča</i>	<i>többrészes egység unità multipla višestruka vuča</i>
norvega pola rumana	<i>multippelstyring trakcja wielokrotna funcționare cu vagoane motoare cuplate</i>	<i>multippel traksjon trakcja wielokrotna tracțiune multiplă</i>	<i>multippel traksjon trakcja wielokrotna Unitate Multiplă</i>
slovena Esperanto (ĝis nun)	<i>krmiljenje vozil v spregi sinkronregado (trakciiloj)</i>	<i>vožnja v spregi trakcio pluropa (duopa, triopa)</i>	<i>vleka večih garnitur trakciunuo pluropa</i>

terminŝanĝaj proponoj:

- | | | |
|--|---|---|
| 1) sinkronigkondukado
trakciilara | sinkronigkonduka
pluropa trakcio | sinkronigkonduka
trakciilaro |
| 2) sinkrona kondukado
de trakciiloj | | |

Elkoran dankon pro via kunago en 2010 kaj plej bonajn dezirojn por la jaro 2011 sincere esprimas Heinz Hoffmann.

Terminara Kuriero

TeKu 146

Decembro 2012

Komunikilo de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de IFEF

Gvidanto de Faka Komisiono:

Jan Uldal Niemann, Hovedvagsstræde 9E, 1 DK-3000 Helsingør

Telefona: +45 49 26 13 19 Retadreso: niemann@kabelmail.dk

Sekretario de Terminara Sekcio:


D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2 DE-01445 Radebeul

Telefona: +49 351 8385877 Retadreso: Hoffmann-IFEF@cablemail.de

NEKROLOGO

La 29-an de Oktobro 2012 mortis nia dana terminara kunlaboranto **E. Henning Olsen** post atingo de sia 82-a vivojaro.

Profesie li laboris sur mult-diversaj postenoj en pluraj fervoj-stacioj. Kiel pasia lingvoamiko li multe kontribuis al Dana Esperantista Fervojista Asocio. De 1982 ĝis 1995 li estis redaktoro de „Internacia Fervojisto”. Pri lia ekzakta ekskursgvido dum la IFK en Ålborg certe multaj ankoraŭ rememoras. Kvazaŭ ĝis la lasta spiro li estis aktiva en nia Faka Komisiono. La lastan ĉefan fakprelegon en *Herzberg* li grandparte kompilis, verkis kaj korektlegis. Nia kara „eho” daŭre restos en nia memoro. Li ripozu en paco.



Karaj gekolegoj,

al la taskoj en TeKu 145 ĝis nun kontribuis *Henning Olsen* †, *Erik Mortensen*, *Jan Niemann*, *Zlatko Hinš*†, *Ladislav Haki* kaj *Tibor Kristály*. Dankon al ili.

Novaj taskoj

Internacia Fervoj-Unio *UIC* lastatempe aldonis pli ol 500 novajn nociojn en sian terminaron. El ili mi elektis por komenca traktado jenajn:

- 12447 Persone rigarda kontrolo de traksekcioj aŭ trakforkoj de regejoj sen anoncosistemo pri libera trako, ke sur la itinero ne troviĝas veturiloj aŭ aliaj obstakloj.

franca *examen visuel à l'œil nu*
germana *Augenscheinprüfung*
hungara *szabad szemmel látható vizsgálat*
itala *esame visuale*

kroata *vizualni pregled*
norvega *visuell inspeksjon*
rumana *control vizual*

terminproponoj:

- 1) itinerkontrolo persone rigarda
- 2) traklibereckontrolo rigarda

14570 Kapableco de traeŭropa fervojsistemo, garantii sekuran kaj senjuntan transliman trajntrafikon laŭ determinitaj kapacitaj destinoj.

angla *interoperability*
 franca *interopérabilité*
 germana *Interoperabilität*

terminpropono:

intersistema funkcieblo

PIV: **funkcii 2** Plenumi la propran difinitan taskon, se parole pri organo, maŝino kaj ĝenerale ĉia ilo aŭ organizo.

14690 Kapableco garantii sekuran internacian trajntrafikon sur diversaj eŭropaj fervojretoj,

- sen haltigi trajnojn ĉe la retlimoj,
- sen tie ŝanĝi trakciilon kaj trakciilkondukiston, kaj
- postulante de trakciilkondukisto agojn krom normigitaj ETCS-manipuloj.

angla *operational interoperability*
 franca *interopérabilité opérationnelle*
 germana *betriebliche Interoperabilität*

terminpropono:


interfervoja operacieblo

PIV: **operacio 2** Aro da rimedoj, kiujn oni kombinas por ekonomia celo.


La sekvaj tri nocioj temas pri specoj de disforkiĝoj, kiuj povas

- esti parto de disforka stacio (TeKu 144) aŭ
- konsistigi eksterstacian disforkejon.

99828 Disforkiĝo konsistanta el simpla trakforko en unu trako, kaj el trakokruĉiĝo (kun aŭ sen kructrakforko) en najbara trako, ebliganta kompletan aŭ partan trakinterligon.




kun kructrakforko




sen kructrakforko

99829 Kombinaĵo el du simplaj trakforkoj kaj trakokruĉiĝo (kun aŭ sen kructrakforko), ebliganta dutrakan disforkiĝon de dutraka fervojlinio.



kun trakokruĉaĵo



kun malsamnivela kruĉvojkonstruaĵo

14577 Trakokruĉiĝo ebliganta debranĉiĝajn veturojn.

Ĉi tiu simpla difino

- esprimas superan nocion super la nocioj 99828 kaj 99829, kaj
- inkluzivas trakokruĉiĝon el unu kructrakforko:



	14577	99828	99829
angla	<i>junction</i>	<i>single junction</i>	<i>double junction</i>
franca	<i>bifurcation</i>	<i>diagonale</i>	<i>bifurcation</i>
germana	<i>Abzweigung</i>	<i>eingleisige Abzweigung</i>	<i>doppelgleisige Abzweigung</i>
hispana		<i>bifurcación sencilla</i>	<i>bifurcación doble</i>
hungara		<i>egyszerű vágánykapcsolás</i>	<i>kétvágányos elágazás</i>

terminproponoj:

1) disforkiĝo kruca

disforkiĝo

disforkiĝo

2) trakokruĉiĝo

unu-el-du-traka

du-el-du-traka

debranĉa

Rimarkigo: Unu-el-unu-traka disforkiĝo ĝis nun ne troviĝas en UIC-terminaro.

14660 Du aŭ pli da trakciiloj interklučitaj mekanike, pneŭmate kaj elektre, kondukataj de unu trakciilkondukisto.

angla *multiple operation*
 franca *service en unites multiples*
 germana *Mehrfachtraktion*

terminpropono:

sinkronigkondukata trakciilaro

PIV: **sinkrona 1** Okazanta samtempe.

sinkronigi 2 Fari, ke du teknikaj movoj okazas en unu sama tempo.

Rimarkigo: Ĉi koncerne oni komprenu, ke motorvagonkombinaĵo, duobla kaj triobla lokomotivo estas unu trakciilo, kvankam konsistas el pluraj veturiloj kun propulsataj radaksoj. Sekve sinkronigkondukado estas aplikata ĉe pluraj interklučitaj solo-lokomotivoj, solo-motorvagonoj kaj – pleje – motorvagonkombinaĵoj.